


Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Numero 209 - Printempo 2019 - £2.50/€3



Kovrila paĝo de “Teach Yourself Complete Esperanto”

Enhavaj Elstaraĵoj - La Put' de Deziremo - Recenzo de TYCE -
La Historio de Neceseja Papero

Esperanto en Skotlando

Numero 209 - Printempo 2019 -ISSN 0014-0643

Kunredaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Kunredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk aŭ hju_rid@yahoo.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuadojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limhoru por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: noktomezo, 30a de septembro 2019**. Oni sendu kontribuadojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la normojn de OpenOffice.org Writer aŭ de LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la normo de Word ankaŭ estos akceptataj. Se la normo aŭ la tiparo uzata por via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj, prefere la x-an por plej facila komputila trakto.

Enhavo

El Katedro.....	3
La Historio de Neceseja Papero.....	5
Averto de Vojaĝanto.....	8
Kelkaj leĝeraĵoj.....	12
Redaktoroj de gazeto "Esperanto en Skotlando" dum ĝia 72-jara eldonado.....	14
Profunde en la put' de deziremo.....	20
La mondo kaj ĝiaj problemoj, hieraŭ kaj morgaŭ.....	21
Recenzo: A modern textbook for the modern world.....	25
Constance Violet Jessop.....	27
Nekrologo: Norman Richardson 1934-2019.....	29
Kalendaro.....	31

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando

Prezidanto: Jean Bisset

Vic-Prezidanto: Simon Varwell

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El Katedro

Ĉi tiu numero atingos vin kiam la politika situacio en la Unuiĝinta Reĝlando estas malpli certa ol ĝi dumlonge estis. Kutime ni ne multe diskutas politikon en niaj paĝoj, tamen ĉi-foje ja estas rilato al Esperanto. Post kelkaj tagoj okazos la 100a kongreso de la Esperanto-Asocio de Britio, kuna aranĝo kun la organizo Espéranto-France, en la sud-orient-angla urbo Dover, (informo ĉe eab@esperanto.org.uk kaj info@esperanto-france.org), rememorante la eventojn de 1904, kiam esperantistoj el la landoj de la Unuiĝinta Reĝlando kaj de Francio okazigis la unuan internacian Esperanto-kongreson, kun kongresa ekskurso al la franca urbo Calais (Kalezo). Ĉi tiu evento estis la vera unua internacia kongreso de Esperanto, kvankam la evento la sekvantan jaron en Boulogne (Bulonjo) estas kutime (erare!) nomata la Unua Universala Kongreso de Esperanto.

La komenco-tago de la baldaŭa 100a Kongreso de la Esperanto-Asocio de Britio, kune kun Espéranto-France estas la 12a de aprilo. Kia taŭga dato! Kial? Ĉar dum mi skribas, tio estas la nun anticipata dato kiam la Unuiĝinta Reĝlando forlasos la Eŭropan Union, kaj kiel dumkongresan ekskurson ni planas ekskurson al Francio, al Kalezo. Se en tiu dato la Unuiĝinta Reĝlando jam forlasos la EU (kaj eĉ tiu fakto verŝajne ne klariĝos ĝis post kiam ni elsendos Esperanto en Skotlando-n, kaj eble eĉ ne tiam), tiu ekskurso okazos enkadre de novaj burokrataj aranĝoj malplifaciligantaj amikecajn kontaktojn inter homoj el diversaj landoj, kiel ekzemple niaj kongreso kaj kongresekskurso. Tamen, estas plezure ekscii, ke tuj post tiuj novaj bedaŭrindaj eventualaj burokrataj aranĝoj, okazos Esperanto-aranĝo kiu (kiel ĉiam) klopodos superi tiajn barilojn inter popoloj, kaj antaŭenigos anstataŭe amikecon inter popoloj.

Parenteze, ankaŭ ne forgesu nian 114an Skotan Kongreson de Esperanto, de la 17a ĝis la 20a de majo en hotelo Robertson Arms, en la urbo Carnwath, Lanark, Skotlando. Estos prelegoj, manĝoj kaj festado en intima atmosfero en la hotelo, kaj ankaŭ 2 ekskursoj. Kaj ankaŭ tie vi trovos etoson de internacia amikeco! Por aliĝi kontaktu: E-Asocio de Skotlando, David Bisset dwbisset@gmail.com

Ed Robertson

La Historio de Neceseja Papero

Stranga temo, vi eble pensas, tamen, sufiĉe interesa kaj ne sen iom da humuro. Nuntempe, ni ne pensas tre multe pri la temo, sed vi povas imagi, kia vivo estus sen ĝi; ĝi estus iom mizera. Kvankam nuntempe oni produktas ĝin en enormaj kvantoj kaj ĝi estas havebla al ĉiuj kiuj povas aĉeti ĝin, tamen estas milionoj da malriĉaj homoj, al kiuj ĝi nur povas esti revo.

La unua scio, kiun ni havas pri la produktado de neceseja papero, estis en la jaro 1391 dum la Song dinastio, kiam la Imperiestro de Ĉinio dekretis la produktadon de papero, je du futoj oble tri futoj, sendube por sia propra persona uzo. Liaj regatoj, mi certas, devis provizi por si mem kaj trovi siajn proprajn necesejojn. Malnovaj grekoj uzis ŝtonojn, konkojn, argilon kaj kion ajn ili povis trovi por purigi sin. La Romianoj, tamen, havis pli kompleksajn ideojn kaj uzis longajn bastonojn kun spongoj alligitaj. Ĉi tiuj estis por komuna uzo kiujn oni konservis en ujoj de forta sala solvaĵo. Romiaj publikaj necesejoj havis longajn marmorajn benkojn kun truoj skulptitaj por ties evidenta celo kaj truoj por la purigado de spongoj. Sendube, sklavoj estis disponeblaj por helpi al la uzo de la instalaĵoj. Malnovajn romiajn artefaktojn, nomataj *pessoi*, oni trovis kaj oni pensis ke ili estis ludaj pecoj. Ili estis ceramikaj diskaj, sed eblas ke ilin oni ankaŭ uzis por purigado.

En Kolonia Ameriko, aferoj estis iom pli progresintaj kaj oni eĉ uzis maizajn spikojn. Oni nur konsciis poste, ke malnovajn ĵurnalojn kaj katalogojn oni povus uzi kaj "Kamparana Almanako" havis truon en la angulo por pendiĝi en la necesejo. En vakeraj filmoj estis normala vido, ke iu iras al la neceseja kuvo kun libro enmane. Ĉi tio ne sugestis, ke li aŭ ŝi intencis pasigi sian necesejan tempon plibonigante sian menson aŭ efektive, ke tiu estas edukitaj. Alia

kialo por porti librojn en la necesejon povus prezentiĝi al la observanto.

En la Hindia Duonkontinento kaj en multaj aliaj partoj de Azio la plejparto de homoj uzas akvon kaj sian manon por purigado post intenca movado kaj se akvo ne estas disponebla, sablon aŭ grundon oni povas uzi. Herboj, folioj kaj aliaj fibraj materialoj estas ofte uzataj tra la tuta mondo kiam aliaj rimedoj ne ekzistas.

La unua malplenigebla necesejo estis inventita en 1596 fare de Sir John Harrington, la baptofilo de la Reĝino Elizabeto la unua (de Anglio), ĝi estis inventita multajn jarojn antaŭ ol la neceseja papero estis inventita. Ĝis tiam oni produktis substancojn kiel kanabo kaj aliaj fibraj materialoj en folioj kaj rulaĵoj kaj mi memoras bone, ke mi devis uzi tiajn materialojn, kiam mi komencis flegi antaŭ multaj jaroj, kiel paperon, kaj tia estis taŭga ilo por la celo. Kvankam la Ĉinoj kapablis fari necesejon por la bonstato de la riĉuloj de Pekino, estis cent jarojn poste, kiam aliaj partoj de la mondo kapablis fari same.

Estis Usonano, Joseph Gayetty, kiu en 1857 inventis la unuan komercan necesejon. Li aĉetis grandegan kvanton da papero, tranĉis ĝin en taŭgajn grandojn kaj pakis la paperon en kvantojn de 500 folioj por \$0.05. Lia nomo estis presita sur ĉiu folio. La papero estis impregnita per aloo, por la celo kuraci ulcerojn kaj helpi al la suferantoj de hemoroidoj, de kiuj sendube estis multaj. Kvankam oni memoras ĝin kiel komercan katastrofon, oni ankoraŭ vendadis ĝin en la malfruaj 1920-aj jaroj. Kelkajn aliajn malsukcesajn provojn oni faris por produkti necesejan paperon antaŭ ol Thomas, Edward kaj Clarence Scott povis produkti komerce sukcesan produktaĵon kaj ĉi tio estis la komenco de la mondvasta produktado de neceseja papero, kiel ni nun konas ĝin.

Kvankam li ne rilatas rekte al la historio de neceseja papero, mi sentas, ke mencio estu farita de la sanitara inĝeniero, Thomas

Crapper, kiu, provizinte kaj adaptinte la akvotubajn aparatojn en Sandringham House, Norfolk, por Princo Eduardo, honorigis per la Royal Warrant. Crapper estis konata pro la kvalito de sia arto. Lia familia nomo ofte estas uzata en alia kunteksto, sed ĝi fakte venas de meza angla origino kaj rilatas al ŝafido kaj aliaj forĵetaĵoj. Oni pensas, ke dum la unua Mondmilito usonanaj soldatoj en Anglio, vidante la nomon "Thomas Crapper" sur domtruoj kaj cisternoj uzis ĝin kiel slango por necesejo*. Multe pli oni povus diri pri la historio de la neceseja papero kaj la plej multaj el ni iam aŭdis komikajn rakontojn ligitaj al tiu temo. Mi finos kun la espero ke la artikolo ne kaŭzis al vi iun aflikton, sed donis al vi iujn informojn pri la historio kaj la fakto ke en la plej granda parto de la mondo tiu provizaĵo ankoraŭ ne estas havebla.

* Noto de redaktoro: en la moderna angla *to crap* estas fislango por *feki*.

Donald A Robertson

Averto de Vojaĝanto

La koramikino kaj mi ĵetas la tornistretojn kontraŭ la muro kie staris la vostofino de viclinio atendanta por eniri la hejmirontan aviadilon. Mi ridas kiam ni sidiĝas surplanke kaj trinkas el la boteloj da glacimalvarma akvo, kiujn ni ĵus aĉetis. Mi enmanigas al ŝi la karajn pasaĝerajn kartojn.

‘Jen tia anekdoto, kian ni rakontos al niaj genepoj!’

Ŝi sukcesas ridetigi sin, kaj poste diras kun aŭtentika rido, ‘Vi ja estas revomensa profesoro!’

Minutojn antaŭe ni lasis en deponejo apud la eta flughaveno de Santorini la luitan aŭton, kiun ni uzadis dum du semajnoj, ekprenis la tornistretojn el la kofrujo, kaj kuregis en la flughavenan konstruaĵon. Minutojn antaŭ tio, mi ŝoforis laŭ la polvaj vojoj for de Thera, la ĉefurbo de Santorini, reen al Mesaria, kie Katharina, mia koramikino, atendis min apud la poŝtokofro ekster la eta ĉionvendejo.

Mi ridetadis pri la memoro de la vizaĝo de “la knabo” en la ĉefa poŝtoficejo en Thera. La “knabo” estis alta je du metroj, plej verŝajne studento, kaj montris acidan mienon. Mi tamen volis pruvi al li mian dankegon, malgraŭ la hasto, kaj dum la mallongaj minutoj kiujn mi ankoraŭ disponis, kuretis al apuda vendejo por aĉeti botelon da malvarma biero. Denove en la poŝtoficejo mi iris rekte al la servejo, ignorante la aliajn atendantajn klientojn, kaj pasigis la botelon tra la krado.

‘Por la knabo’.

La juna virino, la sama kiu helpis min pli frue, rigardis min per larĝa rideto, portis la botelon al la knabo kiu staris ĉe la fora muro de tiu granda halo. Mi vidis ŝin paroli al li kaj poste kapindiki en

mian direkton. Li rigardis kaj devigis al si duonan rideton.
'Sukceson', mi pensis kaj foriris.

Kia diferenco de la 45-minuta atendado en la klienta sekcio de la poŝtoŝtacio, kiam mi sidis apud du laŭtaj usonaj turistoj plendantaj pri la servokvalito en tiu ĉi "triamonda" lando. Ho veran katastrofon vi suferos, mi pensis, oni akceptos vian pakaĵon sufiĉe baldaŭ. Mi rigardis la horloĝon kaj spektis la forgliton de la minutoj. La forfluga horo de hejmenira aviadilo – kaj estas nur unu en semajno – alproksimiĝas rapide. Jen bizaro pri tempo. La knabo eluzis epokojn por reveni, la atendo ŝajnis eterna, sed la tempo antaŭ la flugo, tiu spaco ĉe la alia flanko de la horloĝa indikilo, ŝrumpiĝas rapide. Kaj krome, mi rezonis silente kontraŭ la usonanoj, vi impertinentas. Tiu ĉi lando estas la kovujo de Eŭropa civilizacio, kaj tiu ĉi insulo la centro de la Minoa antaŭ tiu. Nomu ĝin tria monda se vi volas, sed ĝi havas pli da kulturo en unu polvo ol ĉiuj viaj samlandanoj portas en siaj kapoj! Finfine, mi ne plu povis toleri la atendon, nek daŭre aŭskulti la usonanojn, do mi iris al la servejo por demandi la junan virinon ĉu revenis la knabo.

'Ho, jes, li donis al vi edzino'.

Kio? Kial ŝi ne diris al mi pli frue? Mi devas trafi flugon! Ŝi estis tiu, al kiu mi jam klarigis mian problemon, post jam dua vicinia atendado.

'Mi sendos la knabon. Li havas motorbiciklon', ŝi diris tiam.

Je tiu momento mi jam atendis en la unua vicinio dum dek minutoj, nur por malkovri ke la knabino malantaŭ la serveja krado ne parolas angle! Ĝis tiam mi ja disponis tempon. Mi havis sufiĉe da – escepte de tio ke mi ne atendis ke mi devos duan fojon envicliniĝi! Mia ĉefa zorgo pli frue estis nur pri kio, se io, la servistoj povus aŭ pretus fari. Tion pensinte mi ensaltis en la aŭtomobilon dum Katharina restis ĉe la poŝtokofro ekster la ĉionvendejo, kaj mi

ŝoforis – tro rapide, tro malzorge – al Thera lasante malantaŭ mi Mesarian en la polvonuboj.

Dank' al Dio, ke ni ankoraŭ havis la aŭton. La ferio ĝis tiam estis brila. Bela apartamento kun privata naĝejo kaj nur cent metrojn for de la nigraj plaĝoj de Perissa. Ni faris ĉion: la ruinojn ĉe Akrotiri; allogan korŝire belegan Oia-n; naĝojn en la maro antaŭ matenmanĝo; romantikajn vespermanĝojn dum ni superrigardis la *Caldero* kun vido de sunsubiro. Ni estis feliĉaj sed lacaj kaj volis esti hejme. Ni decidis iri unue al la flughaveno, enregistri frue la pakaĵojn, enpoŝtigi la poŝtkartojn, kaj ĝui malstreĉigan kaftason en la du horoj restantaj antaŭ la foriro.

En apuda Mesaria ni trovis ĉionvendejon kie ni aĉetis poŝtmarkojn. Mi aĉetis miajn dum Katharina faris sian kutiman traserĉon de la bretoj. Mi staris ĉe la alia flanko de la pagejoj kaj tralegis miajn kartojn, kontrolante la adresojn. Dum mi faris tion Katharina pagis siajn aĉetaĵojn, sed luktis kun la monujo. Mi iris por helpi kaj ŝi donis al mi la paperojn kiuj malhelpis ŝian monoserĉon. Mi prenis kaj aldonis tiujn al miaj propraj kaj daŭris legi la poŝtkartojn.

‘Bone. Ni bezonas nun nur poŝtokofron’, ŝi diris kiam ŝi finpagis.

‘Jen unu tie, ĉu ne?’ mi demandis, ‘tiu flava afero’. Ni piediris en la helan sunbrilon kaj iris al la flava kesto sur stango.

Kaj jen alia bizara trajto de tempo. Neŭrosciencistoj asertas ke duonsekunda prokrasto ekzistas inter iu okazo en la ekstera mondo kaj ties konscia apero en la menso. La fakto ke mi portis kaj la biletojn kaj pasaĝerajn kartojn kune kun miaj poŝtkartoj saltis en mian konscion ĵus post la maltena signalo forlasis mian cerbon.

‘Ne ankaŭ la biletoj!’ ŝi kriis kiam mi metis la manenhavojn en la fendon de la flava kesto.

Kaj, kompreneble, ili falis kun tiu mola eĥa flustro en la nigran internon de memkontenta flava skatolo, brila en la hela Greka suno.

Hju Rid

Kelkaj leĝeraĵoj

Viro ŝoforis hejmen malfrue posttagmeze, pli rapide ol la leĝa limo. Li rimarkis en la spegulilo polican patrolaŭton kies avertaj lampoj flagras. Li pensis, 'Mi povas superrapidi tiun ulon,' do li premis la pedalon ĝisplanke kaj la konkurso komenciĝas. La aŭtoj fulmis laŭ la ŝoseo pli kaj pli rapide. Fine, kiam la indikilo preterpasis po 160 kilometroj en horo, la viro konkludis ke li ne povos superrapidi la policon do decidis cedi. Li flankedirektis sian aŭton kaj haltis ĉe la trotuarrando.

La policano elvenis el sia patrolaŭto kaj venis al la aŭto de la viro. Li klinis sin kaj diris, "Nu, sinjoro, mi spertis malplaĉegan tagon kaj volas nur hejmeniri. Donu al mi bonan pretekston kaj mi liberigos vin."

La viro pensis dum momento kaj diris, "Antaŭ tri semajnoj, mia edzino forkuris kun policano. Kiam mi vidis vian patrolaŭton en la spegulilo, mi pensis vi estas tiu sama policano kaj provas redoni ŝin al mi!"

Bela juna virino demandis al viro en ŝtofvendejo kiom kostas certa ŝtofo. "Po unu kiso por metro," li respondis. "Bone," ŝi diris, "mi prenos kvin metrojn". La viro, anticipante, mezuris rapide, volvis la ŝtofon kaj donis la pakaĵon al la juna virino, kiu tuj ekprenis kaj fingremontris maljunan virinon apud ŝi. "Avinjo pagas la fakturon hodiaŭ!"

Nervoza eta viro eniris nutrovarejon en urbeto. "Mi volas aĉeti ĉiujn supermaturajn legomojn viajn kaj malfreŝajn ovojn", li diris. "Nu", diris la vendejisto kun rideto en la okuloj, "Sendube vi iros ĉi-vespere al la teatro por vidi la novan komikulon".

“Ne tiel laŭte”, diris la eta viro, ĉirkaŭrigardante hezite, “Mi estas la nova komikulo!”

Redaktoroj de gazeto “Esperanto en Skotlando” dum ĝia 72-jara eldonado

Ne necesas longa enkonduko al tiu artikolo, ĉar ĉiuj en Skotlando bone konas la gazeton kiu aperas regule de post la jaro 1947 ĝis nun en papera kaj eĉ elektronika formoj. Por tio oni devas danki ĉiujn redaktorojn kiuj sindone dediĉis kaj daŭre dediĉas multe da tempo al la redaktado. Kompreneble oni devas ankaŭ danki kontribuantojn kaj la legantojn kies financa subteno ebligas daŭran presadon.

Ivo Lapena en 1951 skribis al la redaktoro dirante: ‘Via gazeto estas sendube unu el la plej valoraj de nia movado. Kelkaj artikoloj vere meritis esti publikigitaj en gazeto kun multe pli da legantoj. Konservu ĉiam la senkompromisan, vere esperantistan linion’.

Redaktoroj de “Esperanto en Skotlando” de junio 1947 estis

No. 1-7, 1947 ĝis 194	William Clarke, Dunfermline
No. 8-28, 1949 ĝis 1956	William Auld, Glasgovo, (kun kvar numeroj redaktitaj de Reto Rossetti)
No.29-42, junio 1956 ĝis julio 1962	Pastro Hugh Martin, Glasgovo
No.43-101 julio 1962 ĝis vintro 1975	Tom Fraser, Kirkcaldy
No.102-168, 1976 ĝis aŭtuno 1996	Dr.Albert Goodheir, Coatbridge
No.169-178, 1996 ĝis somero 1999	Hugh Martin, Birmingham
No.179-182, 1999 ĝis printempo 2000	Dr.Sian Leitch, Inverness
No.183-207, 2001 ĝis 2015	Ed Robertson, Edinburgo
No. 208, 2015 ĝis nun	Hju Rid, Glassford, poste Dunfermline

Jen kelkaj personaj informoj pri la redaktoroj.

William (Bill) Clarke (1895–1982)

Bill estis entuziasma esperantisto el Dunfermline kiu eklernis pri Esperanto de la esperantisto Alec Shepherd en 1939. Li entuziasme studis en kursoj de Reto Rosseti kaj B.E.A. (hodiaŭ E.A.B.). Bill estis membro de tre vigla Kirkcaldy Esperanto grupo kaj de multaj aliaj oficialaj Esperanto organizaĵoj. Li multe vojaĝis, senlace gvidis Esperanto kursojn, kaj estis bona amatora fotografisto.

Bill ĉiam fotis Esperanto-eventojn per kio kreiĝis la serio de valoraj kronikaĵoj, malfeliĉe nun perditaj. Post la tasko redakti **Esperanto en Skotlando** dum sep unuaj numeroj, li fariĝis la helpredaktoro dum la jaroj kiam Tom Fraser estis la redaktoro.

William Auld (Bill) (1924- 2006)

Bill konatiĝis kun Esperanto en 1937 kaj kiam lia skoltestro donacis al li ekzempleron de **Step by Step**, li entuziasmiĝis pri la lingvo. Inter la jaroj 1942 kaj 1947 kiam li estis piloto en la flugarmeo, ĉiam akompanis lin **Step by Step** kaj la **Edinburga vortaro**. Post la milito, reveninte al Glasgovo, li vizitis librotikon en Glasgovo kie li tiam trovis grandan stokon de libroj en Esperanto. Li komencis aĉetadi ilin iom post iom kaj ankaŭ legegi. Dum li loĝis en Glasgovo (poste en Dollar) li aliĝis al du kluboj en Glasgovo, al BEA kaj IEL kaj abonis **Esperanto en Skotlando**. Lia unua eldonita libro **La Balenodonto**, estis komisiita traduko de novelo de Jack London. Tuj poste eldoniĝis la komuna poemaro **Kvaropo**, kaj la verkista kariero de Bill estis lanĉita. Bill ĉiam verkis

nur en Esperanto. Profesie li estis instruisto kaj fariĝis viclernejestro. Li verkis originalajn poemojn kaj romanojn, dramojn, lernolibrojn kaj tradukis multajn verkojn. Liaj eldonitaj libroj nombras ĉirkaŭ kvindek.

Estis longa tempo, dum kiu li ankaŭ fidele servadis kiel redaktoro de **Esperanto en Skotlando, revuo Esperanto, Monda Kulturo, Norda Prismo, Belarto, Fonto, kaj la Brita Esperantisto.**

En 2000, Auld donacis sian tutan esperantan kolekton al la Nacia Biblioteko de Skotlando.

Senlace li ankaŭ gvidis kursojn inter kiuj speciale menciindas la kurso de la Ŝtata Universitato de Sanfrancisko. (Pliaj informoj troviĝas en Esperanto en Skotlando, No. 195.)

Pastro Hugh Martin (1931-2001) Glasgovo

Hugh Martin estis helpema kaj humila persono. Kiel lingvisto, li plenposedis ne nur Esperanton, kiun li lernis dum siaj lernejoj, sed ankaŭ la lingvojn Latinan, Grekan, kaj Hebrean kiujn li akiris pro sia deziro edukiĝi kiel Kristana pastoro. Post ordiniĝo en la Eklezion de Skotlando li enoficiĝis en sia propra paroĥa preĝejo en Glasgovo. Dum siaj jaroj en Glasgovo, li tre aktivis, ĉeestis kunvenojn, gvidis kursojn kaj estis la prezidanto de la Societo dum sep jarojn. En 1956 li fariĝis la redaktoro de **Esperanto en Skotlando.**

Al sia lingvo-posedo li aldonis la Gaelan, la Araban kaj la Islandan. En Islando li deĵoris inter la jaroj 1978 ĝis 1984, en Egiptio de 1984 ĝis 1989. Por la Islanda movado Hugh kompilis grandan Esperanto-Islandan vortaron. En 1993 li kompilis Gaelan-Esperantan/Esperanto-Gaelan vortaron sed nur en tajpskribo. Fine li laboris en Birmingham, Anglio. Kiam en Birmingham, Hugh

akceptis la duan redaktorecon de **Esperanto en Skotlando** kun helpo de la kompostisto Dr. Sian Leitch.

Tom Fraser (ĉ 1908 - 1993).

Tom akceptis la redaktadon sub kondiĉo ke li havu kvar helpredaktorojn. Laŭ Bill Auld, Tom estis 'kvintesenca esperantisto kaj modelo por ĉiuj: fidela, senlaca, ege inteligenta kaj sindona'. Li senĉese gvidis kursojn kaj organizadis esperantistajn renkontiĝojn en Skotlando kun helpo de sia edzino Minnie. Li ankaŭ laboris je la nova, perpoŝta, senpaga kurso, 'per kio centoj de la publiko almenaŭ legis la unuan lecionon'. Dum dek tri jaroj li redaktis la gazeton **Esperanto en Skotlando** kaj estis la aŭtoro de multnombraj spritaj noveloj kaj rakontoj, kiuj bedaŭrinde neniam estis kolektitaj libroforme. Tom estis ankaŭ kapabla versisto kaj poeto kaj altkvalita tradukanto. Inter liaj elstaraj sukcesoj estis traduko de la "Prologo kaj Rakonto de la Pardonisto" de Chaucer.

D-ro. Albert Goodheir (1912-1995)

Albert naskiĝis en Utreĥt en Nederlando kie li poste doktoriĝis en historio ĉe la Utreĥta Universitato. Tie li vivis eĉ dum la nazia okupacio kaj post la Dua Mondmilito li, kiel eksterulo, diplomiĝis pri filozofio ĉe Londona Universitato. Post translokiĝo al Britio, li decidis paŝtiĝi kaj studis ĉe la Glasgova Kolegio. Sekvis postenoj sur insulo Tiree kaj poste en Tayvallich. Alberto nur deziris labori en la paroĥoj kie la salajro estis malalta. Post la emeritiĝo li laboris en Kostarika kaj Ŝetlando en Skotlando, farante diversajn man-laborojn. Dum la tuta tempo li verkis poezion, tradukis el la Latina kaj aliaj lingvoj kaj skribis multajn originalajn romanojn. Krom tio li estis la sekretario de la Glasgova Esperanto Societo kaj la redaktoro de la gazeto **Esperanto en Skotlando**. Li sukcese

redaktoris pri **E en S** dum ĝia malbona financa situacio kaj sukcesis havi kontribuantojn el la tuta Eŭropo. Albert estis pioniro en nia eldonkampo stariginte la firmaon **Kardo**. Li estis eksterdube klerulo sed super ĉio homo senafekta, sociema, kaj bonhumora.

D-ro. Sian Leitch, Mountbatten (1938 -) Inverness

Dr. Sian Leitch naskiĝis en Anglio kaj poste vivis en Inverness, Skotlando. Sian fariĝis la redaktoro en 1999. Li estis persono kun pli ol 30 jaroj da sperto pri komputiloj. Notinda plibonigo en aspekto de **Esperanto en Skotlando** estis tuj evidenta.

Ed Robertson (1952 -)

Ed naskiĝis en 1952. Li licenciĝis en 1973 de la Universitato de Edinburgo pri la germana kaj la rusa, kaj ricevis bakalaŭron de la Malferma Universitato en 1985 pri sciencoj. Ed laboris dum kelkaj jaroj unue kiel instruisto kaj tradukisto, kaj poste fariĝis softvarverkisto. Pri Esperanto li ekinteresiĝis en 1970, sed vere ne serioze eklernis ĝin ĝis 1989. Li estis plurfoje prezidanto de EAS, kaj li estas de post 2011 unu el la kuratoroj de EAB, kaj aktuale unu el la moderatoroj kaj kunverkintoj de la Esperanto-kurso en Duolingo. Ed regule kontribuas al la enhavo de la gazeto per altkvalitaj artikoloj kaj li ĉiam estas favorata preleganto dum kongresoj, celebroy kaj klubaj Esperanto vesperoj.

Hju Rid (Hugh Reid) (1954 -)

Hju naskiĝis en 1954 en Glasgovo.

Li edukiĝis pri fiziko el la Universitato de Edinburgo kaj laboris ses jarojn en Ferranti en Dundee kiel inĝeniero kaj esploristo pri laseroj. Li instruis fizikojn kaj aliajn rilatajn fakojn en Bell College of

Technology, poste la Universitato de Okcidenta Skotlando ĝis frua emeritiĝo.

Li komencis lerni Esperanto kiel studento per la libro “Teach Yourself Esperanto”. Malgraŭ un-du provoj li ne sukcesis finlerni la libron. Finfine en Dundee, jam kun ambicioj lerni aliajn lingvojn sed sen sukceso, li decidis finlerni Esperanton – ĉar se li ne tion povus atingi, li certe ne povos pri aliaj malpli facilaj lingvoj! Li renkontis unuajn Esperantistojn skotajn dum festa lunĉo en Rosebank en 1986 kaj poste fariĝis entuziasma ano de **EAS**. Hju regule ĉeestas eventojn kaj kontribuas per prelegoj. Li skribis multajn artikolojn por **E en S** kie li montris sian talenton por verkado.

Li tradukis malneton en la anglan de la majstroverko de John Francis **La Granda Kaldrono** en 2016. Hju helpis efikigi la unuan represon en elektronika formo de la originala skribita en Esperanto.

Li verkis unuan duonon de sia propra verko *La Tago de Kiborgiĝo* kiun eldonisto Espero eldonis en du lingvoj – la angla kaj Esperanto – en julio 2018. Hju fariĝis redaktoro de Esperanto en Skotlando en 2015.

Ĉiu redaktoroj kiuj akceptas la redaktoran pozicion ŝanĝas la gazetan aspekton. Krome, la presmetodoj pliboniĝis kaj hodiaŭ ni havas belaspektan gazeton je kiu ni fieras.

Trarigardante multajn ekzemplerojn de **E en S**, mi konkludis ke la gazeto vere meritas laŭdon pro ĉiam alta kvalito de legaĵoj kaj ĉio tio dank’ al senlaca, forta laboro de la redaktoroj kaj iliaj helpantoj.

Badaŭrinde, pro manko da spaco, la detaloj pri redaktoroj devas esti iom mallongaj.

M. Casey

Profunde en la put' de deziremo

Mi elkrias
Por espero, pac'
Kaj la tuŝ' de ĝojo
Kiu la koron plenigas
Per sonĝoj kaj karesoj dolĉaj.

Ĉi tie en mallum' likenŝutita
Kuŝas la koro,
Mortige ĉirkaŭita
Pro flugkompato, ĝis larmoj
Kristaler' similaj
Falu kaj degelu.

Profunda estas akvo
Inke malvarma
Kiu doloron frostigadas, sed
Animon mian tranĉas senkompate
Ĝis mi denove krias
Kaj liberon trovas leviĝante.

Liz Baker; tradukita de David W Bisset

La mondo kaj ĝiaj problemoj, hieraŭ kaj morgaŭ

Eble la unua aspekto pri la problemoj de la homaro, kiun ni diskutu, estu ĉu estontece ankoraŭ estos homaro kaj enloĝebla planedo entute. Dum mi skribas ĉi tiujn vortojn, ni troviĝas en februaro, kaj nia vintro ankoraŭ ne estas finita. Tamen, ĝi ne estis kia iuj el la vintroj de mia infanaĝo, kun neĝo ĝis la genuoj. Tio estas almenaŭ mia memoro. Kaj kvankam oni ĉiam memoras la varmajn somerojn de sia junaĝo, ili ja plivarmiĝas. Eble ni ankoraŭ ne tiom sentas ĝin ĝis nun en Skotlando. Mi rimarkis tamen, ke kiam mi lastjare somere estis en Portugalio por la Universala Kongreso de Esperanto, dum pluraj tagoj la temperaturo superis 45 gradojn. Tamen, mi estis kiel eble plej ofte en klimatizita hotelo, sed iri eksteren vere sentis kvazaŭ eniri fornon. Eble se la klimato estas tiom en danĝero, ni plu demandu al ni ĉu ni vere havas gravan problemon.

Ni pripensu, ekzemple, statistikojn pri la varmiĝo de la mondo. Eble ĝi ne estas ĝis nun tro grava situacio en si mem, certe estas evidente, miaopinie, ke la temperaturo grimpas nehaltigeble supren, kaj ja estas problemo.

Vivo estas altvalora, kaj manko de vivo estas malpli valora. Sed tera varmiĝo estas eble averto, ke inteligenta vivo sur nia planedo ne nepre estas destinita daŭri eterne.

Ĉu ekzistas inteligenta vivo ie aliloke en la universo, aŭ ĉu ni estas la sola, kaj do altvalorega specimeno? Kio se ni estas la sola vivanta civilizacio en la tuta universo?

La gravaj demandoj por ĉi tiu diskuto estas eble la jenaj:

Unue: Ĉu nia civilizacio dekadencos kaj falos?

Kaj due: Ĉu la homa specio iam falos?

Eble ni ankaŭ konsideru trian, rilatan demandon, trie:

Ĉu estas aliaj inteligentaj estaĵoj en la universo?

Kaj kvare: Se jes, kial ni ne trovas ilin?

La universo ekzistas jam 13,8 miliardojn da jaroj, nia galaksio 13,5 miliardojn da jaroj, nia suno kaj la Tero eble 4,6 miliardojn da jaroj. Ekzistas proksimume 200 miliardoj da steloj en nia propra galaksio, kaj preskaŭ tiom da galaksioj en la observebla universo. Kiom longe bezonatis por la ekestiĝo de vivo sur nia planedo? La unuaj formoj de vivantaj estaĵoj, unuĉelaj mikroboj ekaperis nur 500 milionoj (milionojn, ne miliardojn) da jaroj post la ekestiĝo de la Tero mem. Fotosintezo sekvis post plia miliardo da jaroj, kaj dum miliardo da jaroj kreis atmosferon riĉan je oksigeno, kreis la unuajn eŭkariotojn, tio estas organismoj kiuj havas ĉelkernojn enhavantajn genetikan informon DNA. Ni devis atendi ĝis antaŭ ducentmil jaroj por inteligentaj bestoj kiu kapablas uzi ilojn, kaj ni atendis la plejmulton de tiuj ducentmil jaroj ĝis alvenis besto kapabla je la unuaj paŝetoj en la kosmon; ni devas starigi ĉi tiun demandon pri la cetero de nia universo:

Kie estas ĉiu?

Aliaj partoj de la universo, eĉ en nia propra galaksio, povas esti preskaŭ naŭ miliardojn da jaroj pli aĝaj ol ni. Naŭ miliardoj da jaroj por evoluigi plantojn, bestojn, kaj civilizaciojn. Naŭ miliardojn da jaroj pli longe ol ni. Sed kie estas la eksterteranoj???

Ĉi tiu paradokso nomiĝas la Fermi-paradokso, nomata laŭ la itala fizikisto Enriko Fermi (1901-1954), kiu unue starigis la demandon.

Estas multaj eblaj respondoj al tiu problemo, kiujn mi listigis. Ĉu vere povas esti ni kiuj estas la unuaj? Ĉu la respondo vere devas esti, ke same kiel ni, la aliaj kandidatoj ĉiuj detruis sin? Kaj ĉu

povas esti, ke se ni ne sukcesos detruiri nin mem, ke ni fariĝos la unua civilizacio kiu superregos nian galaksion, aŭ nian brakon de la galaksio, sklavigos kaj/aŭ detruos niajn najbarojn, simile kiel okazis surtere.

Mi ne pretendas, ke ni estas sur la sojlo de memdetruado, sed la ebleco estas maltrankviliga, eĉ se ĝi ne estas la kialo por la paradokso de Enriko Fermi. Poste vi trovos gamon da "solvoj" al la paradokso. Konsideru, kiun el ili estas via klarigo. Tamen, konsideru ankaŭ, kion ni povos fari por certigi, ke la solvo al la paradokso estis, ke 'la 'inteligentaj' bestoj detruis sian medion, kaj do sin mem'.

Hipotezaj klarigoj pri la Fermi-paradokso, pri kie estas la eksterteranoj:

- A Ekstertera vivo estas malofta aŭ ne ekzistas, pro la fakto, ke ĝi okazos nur en planedo de la ĝusta grandeco, en la ĝusta kvietita loko ĉirkaŭ la ĝusta speco kaj grandeco de stelo, en sufiĉe kvietita parto de la galaksio.
- B Neniuj aliaj inteligentaj specioj ekestiĝis, ĉar eĉ se evoluis diversaj estaĵoj, ili ne estas sufiĉe inteligentaj por krei civilizacion, ja kaze de la Tero, tio okazis nur unufoje.
- C Mankas al inteligentaj eksterteraj specioj progresinta teĥnologio.
- D Inteligenta vivo per si mem laŭnature iam detruos sin.
- E Inteligenta vivo per si mem laŭnature detruas aliajn estaĵojn.
- F Perioda estingiĝo per naturaj eventoj.
- G La inflacio-argumento (senfinaj universoj kun po unu civilizacio).

H Inteligentaj civilizacioj estas tro disaj space aŭ tempe.
I Manko de rimedoj por fizike disvasti tra la galaksio.
J Estas pli malmultekoste disvastigi informon ol fakte vojaĝi.
K Homoj ne ekzistadis sufiĉe longe.
L Ni ne aŭskultas ĝuste.
M Civilizacioj dissendas detekteblajn signalojn nur mallongan tempon.
N Ili tendencas izoli sin.
O Ili estas tro fremdaj.
P Ĉiu aŭskultas sed neniu dissendas.
Q Oni intence ne kontaktas la Teron.
R La Tero estas intence izolita (planetario-hipotezo).
S Estas danĝere interkomunikiĝi.
T Ili jam estas ĉi tie sed neagnoskite.
Kion vi pensas?

Ed Robertson

Recenzo: A modern textbook for the modern world

Tim Owen and Judith Meyer: *Teach Yourself: Complete Esperanto*, Hodder & Stoughton, 2018 – 344p.

Finally, a mass market language publisher has just published a new English-language textbook on Esperanto. Seemingly, such events occur but once in a generation: in 1957 the classic *Teach Yourself Esperanto* by John Cresswell and John Hartley, and then in 1987 there appeared a new edition of the original, revised by James H. Sullivan. This latest work *Teach Yourself: Complete Esperanto* by Tim Owen and Judith Meyer has been written afresh, and is not based on its predecessors. Tim Owen is Director of Education and Development for the Esperanto Association of Britain, and co-author Judith Meyer is renowned as the initiator of the Polyglot Gathering and is also a member of the team behind the Amikumu app.

I had high expectations of this book, and certainly wasn't disappointed. There is also nothing stingy about the size of the volume. Its 344 pages, 18 lessons and 3 revision sections aim to transport the learner to competence at B2 level of the Common European Framework of Reference (CEFR), and each lesson clearly indicates which requirements of this reference framework it aims to fulfil. Students may freely listen to audio material for the lessons available at no further cost on the publisher's website, or in their app. The publication is designed for today's world, and that doesn't only apply to the format. It is for everybody who wants to acquire a robust understanding of Esperanto and the capability of confidently communicating with other people. The key skills of reading, writing, speaking and listening are all encouraged.

The book is also up to date in the educational sense too, and its

"discovery method" is a new idea which is common to all of the publisher's language courses. This encourages the students to reflect, and become aware for themselves of how Esperanto works, which helps them remember tricky issues that have to be learned. It is filled with realistic conversations, vocabulary building, explanations of grammar, self-checks for the students to be aware of their own progress, and thorough practice. ***Teach Yourself Complete Esperanto*** equips the learner with the practical skills and language tips necessary for using Esperanto in a range of realistic modern situations and settings.

At the same time it constantly develops the student's cultural awareness. To begin with, texts are partly in English, but with an ever-increasing proportion of Esperanto words and expressions, and everyday conversations which give a genuine flavour of spoken Esperanto. As with the language tips, there are sporadic cultural tips. The lessons form an introduction to the modern Esperanto world in which international travel is normal, and cultural notes draw a picture of the atmosphere of the Esperanto community. The book is suitable for anyone who wants to proceed confidently through the levels, whether teaching themselves, or with a tutor, or in a class, or as a refresher course.

After studying this course, the student will have acquired solid competence in the four skills of reading, writing, speaking and listening, and will soon be able to communicate confidently and competently. Last, but not least, the price of the book is most acceptable, considering that it is available enormously (50%!) discounted when purchased from the Esperanto Asocio de Britio:

<https://esperanto.org.uk/news/shop/complete-esperanto-complete-bargain/>

Ed Robertson

Constance Violet Jessop

2/10/1887-8/5/1971

Violet Jessop naskiĝis en Irlando al William kaj Catherine Jessop la 2an de Oktobro 1887. Je sufiĉe juna aĝo ŝi iĝis tre malsana, sed malgraŭ kuraĉistaj prognozoj ŝi postvivis kaj nuntempe oni pensas ke ŝi suferis de tuberkulozo. Ŝia patro, William, mortis kiam ŝi estis 16 jarojn aĝa, pro komplikaj post kirurgio, kaj la familio translokiĝis al Anglio kie Violet edukiĝis en monaĥeja lernejo. Ŝia patrino, Catherine, laboris kiel ŝipa stevardino kaj Violet prizorgis sian junan fratinojn. Kiam la patrino de Violet malsaniĝis kaj ne povis labori, Violet sekvis je la paŝoj de la patrino kaj iĝis stevardino kun la White Star Line. Violet estis tre bela juna virino, sed ŝi havis multe da malfaciaĵoj por atingi postenojn, ĝis ŝi decidis vesti sin en tre simplaj vestoj kiuj ŝangis ŝian aspekton. Oni ŝin dungis sen pliaj malfacilaĵoj.

En 1910 Violet iĝis stevardino sur la RMS Olympic, luksa ŝipo de la White Star Line, la plej granda ŝipo surakve tiutempe. La 20-a Septembro 1911 La ŝipo forlasis Southampton kaj koliziis kun la Brita batalŝipo, HMS Hawke. Feliĉe neniu mortis kaj malgraŭ tio ke ĝi estis damaĝita la ŝipo povis atingi la havenon.

Kiam ŝi havis 25 jarojn Violet aliĝis la ŝipon Titanic kaj 14an de aprilo 1912 la ŝipo koliziis kun kontraŭ glacimonto kaj sinkis. Feliĉe por Violet, oni ordonis ŝin iri al la ferdeko por helpi la neanglalingvanojn, kiuj ne komprenis la instrukciojn donitajn al ili. Tiam oni metis ŝin sur savboaton kie ŝi ricevis bebon en sian zorgon kaj tiel ŝia vivo estis savita. La sekvan matenon ili estis prenitaj sur la RMS Carpathia kaj dum surŝipe la infano kiun Violet tenis estis forprenita de virino, kiu verŝajne estis la patrino de la

bebo kiu forkuris kaj ne estis vidata denove.

Je la 12a de novembro 1916 Violet estis flegistino sur la hospitala ŝipo RMS *Britanic* kiam ĝi eksplodis kaj sinkis tre rapide, mortigante 37 homojn. Oni supozas ke la eksplodo estis kaŭzita de torpedo aŭ eksplodanta mino, sed tion oni neniam determinis. Kiam la *Britanic* sinkis, kelkaj el la savboatoj estis tiritaj sub la ŝipaj helicoj. Violet saltis en la maron kaj ricevis kaptajn lezon, sed postvivis.

Violet daŭris labori por la *White Star Line* kaj poste la *Red Star* kaj *Royal Mail Lines*. Ŝi dufoje travojaĝis la mondon en la ŝipo *Beigenland*, havis mallongan geedziĝon en siaj malfruaj tridekaj jaroj. Ŝi emeritiĝis en 1950. Violet estis konata al kelkaj personoj kiel la *Sinjorino Nesubakvigebla*. Violet mortis pro koraj problemoj en 1971 kiam ŝi havis 84 jarojn. Ŝia karaktero estis reprezentita sub aliaj nomoj en filmoj kaj en verko de teatro. Ŝia vivrakonto estas bone konata kiel ekzemplo de kuraĝo super malfacilo.

Donald A Robertson.

Nekrologo: Norman Richardson 1934-2019

Norman naskiĝis en Hamilton, studis en la Universitato de Glasgovo, kaj instruis la anglajn lingvon kaj literaturon en la liceo kie li edukiĝis. Dum la tuta vivo li havis pasion rilate al siaj studobjektoj; estis granda plezuro pridiskuti kun li tiujn temojn.

La sanstato de Norman ne estis perfekta, sed lia ĉiama deziro estis fari ĉion kion li povis fari dum li ankoraŭ havis forton. Kaj tion li certe faris: li apartenis al la plejmulto de la lokaj societoj, kaj apenaŭ troviĝis en la propra domo! Li volis sperti ĉion; kaj estis konata vizaĝo en multaj ĉirkaŭtekstoj. Du tagojn antaŭ lia morto li estis inter la ĥoranoj en sia preĝejo. Mi parolis kun li tuj post la Diservo. Lia malsaneco estis frapa, sed li diris, ke li ĉiam volas kanti, ĉar muziko treege gravas. Tia homo li estis.

Kune kun literaturo li fervoris pri fervojoj kaj katoj! Lia scio pri la fervoja sistemo estis enciklopedia. Ne nur pri la nuna, sed plendetale pri la pacinteca. Oni faris demandon kaj la respondo estis majstra. Plaĉis al Norman piediri en la kamparo; ofte la celo estis eksfervojaj linioj. La legenda varieco de la skota vetero estis nenia obstaklo! Kaj pri katoj? Por Norman kaj Diana ili estis benataj bestetoj kun alta loko en la viva hierarkio! Marjorie Boulton por ili havis plej superan reputacion: ŝi verkis esperante pri katoj!

La Eklezio estis grava por Norman. Post agnostika periodo li trovis tion, kion li serĉis en la Anglikana tradicio de Sanktaj Skriboj, Tradicio kaj bela liturgio.

Norman posedis la modestecon de veraj kleruloj, kaj li ankaŭ estis modesta pri sia scio de nia lingvo. Tamen, li ĉiam faris sian kontribuon ĉu ĝi estis prelego ĉu artikolo. Li estis fidela membro de SEA dum multaj jaroj. Komence li estis iomete skeptika pri Esperanto kiel altnivela, literatura lingvo, sed li ŝanĝis sian

negativan takson kiam li aŭdis kaj legis la poemojn de Bill Auld.
Post tio duboj malaperis kaj li esperantistiĝis!

Norman estis kvieta homo, sed estis unu eksterordinara incidento
en lia vivo: li fuĝis sekrete kun Diana kaj ili geedziĝis post vojaĝo
per trajno al Skotlando!

Kaj sidlokoj mankis ĉe la Funebra Celebrado de humila kaj amata
homo.

David W Bisset

Kalendaro

1 - 5. majo

[78a Hispana Kongreso de Esperanto](#) - en Málaga, Hispanio.

78a Hispana Kongreso de Esperanto okazos komence de majo en Malago (Málaga, Andaluzio) tiel, ke vizitantoj havos la ŝancon ĉeesti samtempe tri altirajn eventojn kun ties propra etoso Hispana, Andaluza kaj IFEF kongresoj. Ili estos parte sendependaj kaj parte koincidaj, kaj do oni povas partopreni en iliajn agadojn depende de siaj disponeblo kaj ŝato. Ni invitas vin partopreni tiun ĉi feston de la esperantista kulturo. Kontakti la organizantojn ankaŭ se vi deziras kunlabori en la organizado kaj proponi iun programeron. Organizas: Hispana Esperanto-Federacio (HEF), Andaluza Esperanto-Unuiĝo (AEU), strato Anfora, 6-5ºD, 29013-Malago (Hispanio). - retadreso: kongreso@esperanto.es

1 - 9. majo

[Mirinda Lviv](#) - en Lvov, Ukrainio.

Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio. Organizas: Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. - retadreso: [Volodimir Hordijenko](mailto:Volodimir.Hordijenko)

17 – 20 majo

[114a Skota Kongreso de Esperanto](#) en Carnwath, Skotlando.

Hotelo Robertson Arms, CARNWATH. Retadreso: jean.bisset@yahoo.co.uk

29. majo - 2. junio

[Polyglot Gathering 2019](#) - en Bratislava, Slovakio.

La Polyglot Gathering estas neformala evento, kiu okazas po unu fojo jare kaj kunigas poliglotojn (homojn, kiuj parolas plurajn lingvojn) kaj lingvemulojn de la tuta mondo. Ĝi estas kvin-taga evento kun prelegoj, atelieroj kaj sociaj agadoj por ĉiuj, kiuj amas kaj ĝuas lingvojn. Organizas: E@I, Vít'azná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. - retadreso: info@polyglotbratislava.com

29. junio - 7. julio

[Roskilde-Festivalo](#) - en Roskilde, Danio.

Ĝuu senpagan aliron al la plej granda, gaja rok-festivalo de Danio. Ni uzas nian lingvon praktike dum volontula laboro ĉe pordego. Ni laboras, kuiras, loĝas kaj festas kune. Vidu pli da informoj en nia retejo. Organizas: Dana Esperantista Junulara Organizo (DEJO). - retadreso: roskildefestivalo@gmail.com

20 - 27. julio

[La 104-a Universala Kongreso de Esperanto](#) - en Lahtio, Finnlando.

Organizas: Universala Esperanto-Asocio. Retadreso: kongresoj@co.uea.org

4 - 11. aŭgusto

[92a SAT-Kongreso](#) - en Barcelono, Katalunio, Hispanio.

Jara kongreso de la Sennacieca Asocio Tutmonda Organizas: Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio. - retadreso: kontakto@satesperanto.org

20 - 22. septembro


[7-a renkontiĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo"](#) - en Bjelovar, Kroatio.

Tradicia aranĝo, kiu en 2019 estos dediĉita al festado de la 110-a datreveno de Esperanto en Bjelovar. Programo: interkona vespero, solena muzika kaj kultura programo, arta kaj dokumenta ekspozicioj en la Urba Muzeo, deklamkonkurso, prezento de monografio pri Esperanto kaj dokumenta filmo, prezento de novaj libroj kaj ekskurso al landa Esperanto-arkivo (Dokumenta Esperanto-Centro en Durdevac). Organizas: Bjelovara Esperantista Societo, Josip Pleadin - retadreso: esperanto.bjelovar@gmail.com

Por via taglibro (Ĉar tiu ĉi anonco devos aperi en la Kalendaro de numero 211, Printempo 2020)

La 4a Tutkelta Kongreso de Esperanto okazos en Plouezec, Bretonio de la 15a ĝis la 21a de aŭgusto 2020. Pliaj detaloj aperos poste. Kontakto: [Laurent Peuch](#). (ltpeuch@hotmail.com).

Skanu la suban kodon por eki
konversacion kun nia paĝo en
Facebook



Skanu la suban kodon por
trovi nian retejon

